

LA GRANDA LERNADO

(La unua el la Kvar Libroj de
Konfuceismo)

(PROVA TRADUKO)

大学

(儒学经典《四书》之一)

(试译稿)

Esperantigita de Wang Chongfang

王崇芳世译

ENHAVO

Antaŭparolo

La Teksto de La Granda Lernado

Apendico: saĝaj vortoj el La Granda Lernado

PRONONCA ŜLOSILO DE LA PROPRAJ NOMOJ EN NIAJ TRADUKOJ

专有名词中汉语拼音字母读法

La ĉinaj propraj nomoj latinigitaj laŭ la ĉina oficiala sistemo de transskribo povas esti prononcataj proksimume kiel la Esperantaj kun la jenaj esceptoj:

Konsonantoj:

ch = ĉ h = ĥ j = ĝj q = ĉj r = ĵ sh = ŝ w = ŭ x = ŝj y = j zh = ĝ

Kombinoj de vokaloj:

ai = aj ei = ej ao = aŭ ou = oŭ ia = ja ie = je iao = jaŭ iou = joŭ uo = ŭo uai = ŭaj
uei = ŭej uan = ŭan uang = ŭang weng = ŭeng yu = ju ŭ = ju u post j, q, x = ju

ANTAŬPAROLO

La Granda Lernado estis origine unu el la artikoloj en *La Libro de Ritoj* (礼记). Kleruloj en la pasinteco kredis, ke ĝi estis skribita de Zeng Shen (曾参), disĉiplo de Konfuceo, sed modernaj kleruloj ĝenerale konsideras ĝin verko verkita de konfuceanoj dum la dinastioj Qin kaj Han.

Troviĝis nenia aparta eldono de *La Granda Lernado* antaŭ la dinastio Song. La kleruloj Han Yu (韩愈) kaj Li Ao (李翱) de la dinastio Tang tiel alte taksis *La Grandan Lernadon*, ke ili konsideris ĝin samvalora kiel la aliaj klasikaĵoj de la konfuceismo, kiel ekz. *Mengzio* (孟子) kaj *Libro de Ŝanĝiĝoj* (易经). Sekvante tiun ĉi vidpunkton, kleruloj de la dinastio Song eliris ĝin el *La Libro de Ritoj* kaj presis ĝin en aparta libro. La grandaj kleruloj Cheng Hao (程颢) kaj Cheng Yi (程颐) multe estimis *La Grandan Lernadon* kaj rigardis ĝin kiel instruaron transdonitan rekte de Konfuceo kaj ties disĉiploj, gvidlibron de bona konduto por tiuj, kiuj komencas lernadon. Se oni laŭgrade studos *La Grandan Lernadon*, oni apenaŭ devios de la ĝusta agmaniero. La du Cheng-oj kontrole komparis ĝiajn vortojn, frazojn kaj esprimojn, kaj rearanĝis la ĉapitrojn.

En la regperiodo de Chunxi de la dinastio Song alia granda klerulo Zhu Xi verkis *Komentaron kun Sintaksa kaj Semantika Analizo de La Granda Lernado* (大学章句), *Komentaron kun Sintaksa kaj Semantika Analizo de LA Doktrino de Mezeco* (中庸章句), *Analektojn de Konfuceo kun Kolektitaj Komentarioj* (论语集注) kaj *Mengzion kun Kolektitaj Komentarioj* (孟子集注), kaj ili estis publikigitaj samtempe kiel serio titolita “Kvar Filozofiaj Libroj” (四子), kiu estis kune nomata de la postaj generacioj kiel *la Kvar Libroj kun Kolektitaj Komentarioj* (四书集注). Ekde tiam, *La Granda Lernado* estis taksata kiel egalvalora al *LA Doktrino de Mezeco*, *Analektoj de Konfuceo*, kaj *Mengzio*, kaj sekve *La Granda Lernado* estis rigardata kiel aparta klasikaĵo de Konfuceismo.

Zhu Xi faris grandan penadon por skribi sian *Komentaron kun Sintaksa kaj Semantika Analizo de La Granda Lernado*. Surbaze de la atingoj de la esplorado de la du Cheng-oj kaj sia propra kompreno, ankaŭ li rearanĝis la enhavon de la teksto, kaj klasigis ilin sub du kategoriojn: La teksto de Konfuceo (en nia traduko estas la sekcio §00) kaj la komentarioj de la filozofo Zeng (en nia traduko estas la sekcioj §01 ĝis §10). Li montris, ke la teksto de Konfuceo estas la vortoj de Konfuceo mem, transdonitaj de la filozofo Zeng Shen, kaj la komentario entenas la opiniojn de Zeng Shen pri la teksto de Konfuceo, kiuj estis registritaj de liaj disĉiploj.

Zhu Xi havis plej grandan estimon al la enhavo de *La Granda Lernado*. Por li *La Granda Lernado* estis pli peza ol la *Analektoj de Konfuceo* kaj *Mengzio* en sia graveco, kaj ke li metis *La Grandan Lernadon* en la unuan lokon en siaj *Kolektitaj Komentarioj pri la Kvar Libroj*, ja estis graveda je profunda signifo. Li plurfoje emfazis, ke lernado devus komenci per studado de *La Granda Lernado*, kaj argumentis: “Oni devus antaŭ ĉio ĝisfunde posedi *La Grandan Lernadon* por atingi la gvidprincipojn, ĉar la substancoj de la aliaj klasikaj verkoj estas miksitaj en ĝi. Oni devas unue akiri la ĝisfundan komprenon de *La Granda Lernado* kaj poste daŭrigi la studadon de la aliaj klasikaj verkoj, kaj nur tiam

oni povos konstati, ke tio, kion oni traktas, estas la metodoj esplori la estaĵojn kaj la fenomenojn de la naturo por akiri sciojn, honestigi sian konduton, sincerigi siajn pensojn, kulturi sian personecon, harmoniigi sian familion, bone regi sian regnon kaj alporti feliĉan pacon al la mondo (格物、致知、诚意、正心、修身、齐家、治国、平天下). Li disvolvis sian faman teorion “tri programojn” kaj “ok artikolojn” en sia *Komentario kun Sintaksa kaj Semantika Analizo de La Granda Lernado*. (Lia “tri programoj” signifas “briligi la briligitan virton, instigi la homojn fari renovigon al sia vivo kaj inspiri al ili la kuraĝon strebi al la absoluta perfekteco” (明明德，在新民，在止于至善), kaj liaj “ok artikoloj” estis esplori la estaĵojn kaj la fenomenojn de la naturo, akiri sciojn, honestigi sian konduton, sincerigi siajn pensojn, kulturi sian personecon, harmoniigi sian familion, bone regi sian regnon, kaj alporti feliĉan pacon al la mondo). Lia vidpunkto havis tre grandan influon sur la postajn generaciojn.

Mi, kiel ĉino, tre fieras pri la ĉina riĉa kultura heredaĵo, kiun postlasis al ni niaj prapatroj. Mi elkreskis en la medio de la ĉina kulturo, kaj ekde mia infanaĝo mi ĉiam amas nian ĉinan tradician kulturon kaj la saĝecon de la majstroj de la diversaj pensoskoloj antaŭ la dinastio Qin. Mi ĉiam havas la opinion, ke ĉinaj gravaj klasikaĵoj devos havi siajn Esperantajn tradukojn. Jen kial mi entreprenis la tradukon de tiu ĉi grava ĉina klasikaĵo.

Mia traduko sin bazas ĉefe sur la *Komentario kun Sintaksa kaj Semantika Analizo de La Granda Lernado* de Zhu Xi, kun konsulto de diversaj aliaj eldonoj de la originalo kun notoj kaj komentarioj de moderna ĉina lingvo, por pli precize kompreni la originalon kaj pli bone esprimi ĝin en Esperanto, sed malgraŭ tio mi devas peti pardonon de la legantoj pro mia limigita kapablo, kiu neeviteble kaŭzis neĝustaĵojn kaj erarojn en mia traduko.

WANG Chongfang, la tradukinto
2019-06-19

LA GRANDA LERNADO

Mia majstro, la filozofo Cheng, diris, ke La Granda Lernado estas libro postlasita de Konfuceo kaj formas la pordon, tra kiu la komencantoj de la lernado eniras en la virton. Nur dank’ al ĝia konservo nun ni povas konstati la ordon, en kiu la antikvuloj faris sian lernadon: ili nepre devis komenci per tiu ĉi libro kaj daŭrigis per la Analektoj de Konfuceo kaj la Libro de Menzio. Sekvante tiun ĉi ordon, la lernantoj certe povas esti liberaj de preskaŭ ĉiaj eraroj.

子程子曰：“大学，孔氏之遗书，而初学入德之门也。”于今可见古人为学次第者，独赖此篇之存，而论、孟次之。学者必由是而学焉，则庶乎其不差矣。

LA TEKSTO DE KONFUCEO

孔经

§00

§00-01

Tio, kion la *Granda Lernado* instruas, celas briligigi la briligitan virton, instigi la homojn fari renovigon al sia vivo kaj inspiri al ili la kuraĝon strebi al la absoluta perfekteco.

大学之道，在明明德，在亲民，在止于至善。

§00-02

Kun tiuj ĉi celoj en la menso oni povas firmigi sian aspiron; kun sia firmigita aspiro, oni povas kvietigi sian mensostaton; kun sia kvietigita mensostato, oni povas fari profundan pensadon; kaj nur kun sia profunda pensado, oni povas atingi la deziratan celon.

知止而后有定，定而后能静，静而后能安，安而后能虑，虑而后能得。

§00-03

Ĉiu afero havas sian radikon kaj siajn akcesoraĵojn, sian komencon kaj sian finon. Komprenante tiun ĉi ordon de graveco oni povas proksimiĝi al tio, kio estas instruata en la *Granda Lernado*.

物有本末，事有终始，知所先后，则近道矣。

§00-04

En la antikveco tiu, kiu deziris plibriligigi sian briligitan virton en la mondo, devis antaŭ ĉio fari sian regnon bone regata; kiu deziris fari sian regnon bone regata, devis antaŭ ĉio harmoniigi sian familion; kiu deziris harmoniigi sian familion, devis antaŭ ĉio kulturi sian personecon; kiu deziris kulturi sian personecon, devis antaŭ ĉio honestigi sian konduton; kiu deziris honestigi sian konduton, devis antaŭ ĉio sincerigi siajn pensojn; kiu deziris sincerigi siajn pensojn, devis antaŭ ĉio peni akiri ankoraŭ pli da scioj. La metodo akiri sciojn kuŝas en la esplorado de la estaĵoj kaj la fenomenoj de la mondo.

古之欲明明德于天下者，先治其国；欲治其国者，先齐其家；欲齐其家者，先修其身；欲修其身者，先正其心；欲正其心者，先诚其意；欲诚其意者，先致其知；致知在格物。

§00-05

Per la esplorado de la estaĵoj kaj la fenomenoj oni povas akiri sciojn; kiam scioj estas akiritaj, oni povas sincerigi siajn pensojn; kiam la pensoj estas sincerigitaj, oni povas honestigi sian konduton; kiam la konduto estas honestigita, oni povas kulturi sian personecon; kiam la personeco estas kulturita, oni povas harmoniigi sian familion; kiam la familio estas harmoniigita, oni povas bone regi sian regnon; kiam la regno estas bone regata, la tuta mondo povas esti en feliĉa paco.

物格而后知至，知至而后意诚，意诚而后心正，心正而后身修，身修而后家齐，家齐而后国治，国治而后天下平。

§00-06

La kulturado de la persona morala karaktero havas fundamentan gravecon por ĉiuj

homoj, inkluzive la Filon de la Ĉielo, ministrojn kaj la ordinarajn popolanojn.

自天子以至于庶人，壹是皆以修身为本。

§00-07

Kiam la radiko estas malordigita, tiam estas neeble reguligi ĝiajn akcesoraĵojn. Estas same neeble ankaŭ, ke tiu, kiun vi afable traktas, povas vin trakti krude, aŭ ke tiu, kiun vi krude traktas, povas vin trakti afable.

其本乱而未治者否矣，其所厚者薄，而其所薄者厚，未之有也！

La supra ĉapitro de la klasika teksto estas la vortoj de Konfuceo, transdonitaj de la filozofo Zengzi. La subaj dek ĉapitroj de klarigado, kiu entenas la opiniojn de Zengzi, estis registritaj de liaj disĉiploj. En la malnovaj eldonoj de tiu ĉi verko aperis ne malmultaj eraroj kaŭzitaj pro la malordigo de bambuaj tabuletoj, sur kiuj estis gravurita la teksto. Kaj nun, surbaze de la reĝustigado fare de la filozofo Chengzi, mi denove ekzamenis la tekston kaj reordigis la ĉapitrojn kiel la jenajn: —

右经一章，盖孔子之言，而曾子述之。其传十章，则曾子之意而门人记之也。旧本颇有错简，今因程子所定，而更考经文，别为序次如左。

KOMENTARIO DE LA FILOZOFO ZENG

曾传

§01

§01-01

Estas dirite en *Kang Gao*, libro pri la dinastio Zhou: “Oni devas esti kapabla briligi sian virton.”

康诰曰：“克明德。”

§01-02

Estas dirite en *Tai Jia*, libro pri la dinastio Shang: “Konstante tenu en la memoro la mision komisiitan de la Ĉielo.”

大甲曰：“顾諟天之明命。”

§01-03

Estas dirite en *Di Dian*, libro pri la idealaj imperiestroj Yao kaj Shun: “Oni devas manifesti sian virton”.

帝典曰：“克明峻德。”

§01-04

Ĉio ĉi tio postulas, ke oni faru sian virton klare vidata al ĉiuj.

皆自明也。

La supra unua ĉapitro de la komentario klarigas la plilumigon de la luma virto
右传之首章。释明明德。

§02

§02-01

Sur la bankuvo de Tang, la fondinto de la dinastio Shang, estas gravuritaj la jenaj vortoj: “Se vi povas hodiaŭ purigi vin por havi novan komencon en la vivo, havu do novan komencon en ĉiu tago, kaj persiste havu ĝin ĉiutage dum la vivo.”

汤之盘铭曰：“苟日新，日日新，又日新。”

§02-02

Kaj estas dirite en *Kang Gao*: “Instigu la popolamason havi novan komencon en la vivo.”

康诰曰：“作新民。”

§02-03

Estas dirite en *Libro de Poezio*: “Kvankam Zhou estis regno malnova, tamen nova estis la ordono de la Ĉielo, kiun ĝi plenumis.”

诗曰：“周虽旧邦，其命惟新。”

§02-04

Tial la suverenoj de alta moraleco ĉiam kaj ĉie faras sian plejblon por strebi al novaj komencoj.

是故，君子无所不用其极。

La supra dua ĉapitro de la komentario klarigas la renovigon de la homoj.
右传之二章。释新民。

§03

§03-01

Estas dirite en *Libro de Poezio*: “La granda ĉefurbo kaj ĝia vasta ĉirkaŭaĵo estas loko, kie popolo preferas loĝi.

诗云：“邦畿千里，惟民所止。”

§03-02

Estas dirite en *Libro de Poezio* ankaŭ: “La pepanta oriolo ripoze sidas sur la angulo de monteto.” Konfuceo diris: “Kiam la oriolo deziras ripozi, ĝi scias, kie ĝi preferas sidi; ĉu la homo ne estas tiel saĝa, kiel ĝi?”

诗云：“缙蛮黄鸟，止于丘隅。”子曰：“于止，知其所止，可以人而不如鸟乎！”

§03-03

Estas dirite en *Libro de Poezio*: “La respektinda reĝo Wen estis honesta kaj malkaŝema. Li ĉiam agis kun singardo.” Kiel suvereno li dediĉis sin al la humaneco kaj la justeco; kiel ministro li dediĉis sin al la respektado al la suvereno; kiel filo li dediĉis sin al la fila devo al la gepatroj; kiel patro li dediĉis sin al la patra amo al la gefiloj; kiel amiko li dediĉis sin al la honesteco kaj la fidindeco.

诗云：“穆穆文王，于缉熙敬止！”为人君，止于仁；为人臣，止于敬；为人子，止于孝；为人父，止于慈；与国人交，止于信。

§03-04

Estas dirite en *Libro de Poezio*: “Ĵetu rigardon al la meandroj de la rivero Qi, kaj vi vidos tie la verdan bambuaron dense kreskantan. Jen estas nia eleganta princo bone kulturita! Li studas tiel diligente, kiel se li tranĉus kaj fajlus oston por fari el ĝi instrumenton; li sin kulturis tiel zorgeme, kiel se li skulptus kaj polurus belan jaden. Li estas singarda kaj decidema; li estas dignoplena. Tia eleganta princo bone kulturita neniel povas esti forgesita de sia popolo.” La esprimo en la poemo “tranĉi kaj fajli oston” aludas la diligentecon en la studado de la duko de la regno Wei; la esprimo “skulpti kaj poluri belan jaden” aludas la respektemon kaj singardecon, kiujn li havis en sia koro; la vorto “dignoplena” aludas lian sintenon; kaj la vortoj “tia eleganta princo bone kulturita neniel povas esti forgesita de sia popolo” signifas, ke lia alta moraleco atingis la perfektecon kaj ke la popolo ĉiam gardas lin en la koro.

诗云：“瞻彼淇澳，萋竹猗猗。有斐君子，如切如磋，如琢如磨。瑟兮僩兮，赫兮喧兮。有斐君子，终不可諠兮！”如切如磋者，道学也；如琢如磨者，自修也；瑟兮僩兮者，恂栗也；赫兮喧兮者，威仪也；有斐君子，终不可諠兮者，道盛德至善，民之不能忘也。

§03-05

Estas dirite en *Libro de Pezio*: “Ho, la estintaj grandaj regantoj estas neforgeseblaj!” La suverenoj de la postaj epokoj, sekvante ilian ekzemplon, respektis siajn virtajn ministrojn kaj amis siajn parencojn; iliaj regatoj ĝuis iliajn favorojn kaj profitis de tio, kion ili fondis por la bono de la popolo, kaj tial, tiuj grandaj regantoj estas neniam forgesitaj.

诗云：“于戏前王不忘！”君子贤其贤而亲其亲，小人乐其乐而利其利，此以没世不忘也。

La supra tria ĉapitro de la komentario klarigas la strebadon al la absoluta perfekteco.

右传之三章。释止于至善。

§04

§04-01

Konfuceo diris: “Juĝante procesojn, mi estas same kiel la aliaj. Laŭ mi, tio, kio estas necesa, estas igi la popolon havi nenian proceson.”

子曰：“听讼，吾犹人也，必也使无讼乎！”

§04-02

Tio signifas, ke oni devas malebligi al la falsemuloj laŭvole paroli, kaj peni fari la grandajn virtojn superregantaj, ke la popolo observu la leĝojn kun timo. Jen kio estas nomata la sciado de la fundamento.

无情者不得尽其辞。大畏民志，此谓知本。

La supra kvara ĉapitro de la komentario klarigas la radikon kaj la akcesoraĵojn
右传之四章。释本末。

§05

Tio estas nomata la konado de la radiko. Tio estas nomata la atingo de la perfekteco de la sciado.

此谓知本，此谓知之至也。

La supra kvina ĉapitro de la komentario klarigas la signifon de “la esplorado de la estaĵoj kaj la fenomenoj de la mondo por akiri sciojn”, sed nun ĝi estas perdita. Mi arogas al mi provi fari kompletigon sekvante la vidpunkton de la filozofo Cheng kiel la jenon:

La signifo de la frazo “la metodo akiri sciojn kuŝas en la esplorado de la estaĵoj kaj la fenomenoj de la mondo” estas la jena:

Se ni deziras perfektigi nian sciadon, ni devas esplori la principojn de ĉio, kun kio ni venas en kontakton, ĉar la homa inteligenta menso certe estas funkciigata por sciado, kaj ekzistas neniu estaĵo aŭ fenomeno, kiu ne havus sian propran principon, kaj tial, se nur ĉiuj principoj ne estas plene esploritaj, la homa sciado restas nekompleta.

右传之五章，盖释格物、致知之义，而今亡矣。闲尝窃取程子之意以补之曰：“所谓致知在格物者，言欲致吾之知，在即物而穷其理也。盖人心之灵莫不有知，而天下之物莫不有理，惟于理有未穷，故其知有不尽也。”

Pro tio la Granda Lernado por plenaĝuloj, en la komenco de siaj lecionoj, instruas al la lernanto, rilate ĉiujn estaĵojn kaj fenomenojn en la mondo, komenci per tio, kion li jam scias pri la principoj, kaj daŭrigi sian esploron, ĝis li atingas la ekstremecon. Post tia penado longatempa li povos iam subite trovi sin jam posedanta vastan kaj profundan penetron. Tiam la ecoj de ĉiuj estaĵoj, eksteraj aŭ internaj, subtilaj aŭ krudaj, fariĝos ĉiuj komprenataj, kaj la menso, en sia tuta substanco kaj siaj rilatoj kun la estaĵoj, estos perfekte inteligenta. Tio estas nomata la esplorado de la estaĵoj. Tio estas nomata la perfekteco de la sciado.

是以大学始教，必使学者即凡天下之物，莫不因其已知之理而益穷之，以求至乎其极。至于用力之久，而一旦豁然贯通焉，则众物之表里精粗无不到，而吾心之全体大用无不明矣。此谓物格，此谓知之至也。”

§06

§06-01

Tio, kio estas nomata la sincerigo de la pensoj, signifas, ke oni nepre ne trompas sin mem. Same kiel oni abomenas la fetoron kaj same kiel oni amas la virinan belecon, ĉio, kio venas el la koro, devas esti sincera — tio estas nomata la memdisciplino, la maniero

fari sin kontenta. Tial la homo de alta moraleco devas esti singarda pri siaj manieroj eĉ tiam, kiam li estas tute sola.

所谓诚其意者：毋自欺也，如恶恶臭，如好好色，此之谓自谦，故君子必慎其独也！

§06-02

Sed la homo vulgaranima kaptas ĉiun okazon, en kiu li estas sola, por fari senskrupule malmoralaĵon, sed kiam li aperas antaŭ homo de alta moraleco, li kaŝas siajn malbonajn agojn kaj elmontras nur siajn bonajn kvalitojn tute ne sciante ke, kiam aliaj rigardas lin, ili kvazaŭ povas vidi eĉ liajn pulmojn kaj hepaton. Tiukaze, kian utilon do havas la kaŝado de la malbono kaj la elmontro nur de la bono? Ĉio profunde kaŝita en la koro neeviteble manifestiĝas ekstere, tial la homo de alta moraleco nepre devas esti singarda pri siaj manieroj eĉ tiam, kiam li estas tute sola.

小人闲居为不善，无所不至，见君子而后厌然，揜其不善，而着其善。人之视己，如见其肺肝然，则何益矣。此谓诚于中，形于外，故君子必慎其独也。

§06-03

La majstro Zeng diris: “Kun multaj okuloj rigardantaj kaj multaj fingroj montrantaj, oni neniel povas ne esti singarda pri siaj agoj!”

曾子曰：“十目所视，十手所指，其严乎！”

§06-04

La riĉeco ornamas la loĝejon, la virto ornamas la homon, kaj kiam oni havas larĝan spiriton, oni sentas sin sana kaj feliĉa. Tial la homo de alta moraleco nepre devas sincerigi siajn pensojn.”

§06-05

富润屋，德润身，心广体胖，故君子必诚其意。

La supra sesa ĉapitro de la komentario klarigas sincerigon de la pensoj.

右传之六章。释诚意。

§07

§07-01

Tio, kion signifas la diro, ke la kulturado de la persona morala karaktero dependas de la ĝustigo de la menso, povas esti ilustrita tiele:

Kiam la homo havas la koron loĝata de kolero, li ne povas ĝustigi sian menson; kiam lia koro estas premata de timo, li ne povas ĝustigi sian menson; kiam lia koro estas plena de plezurserĉemo, li ne povas ĝustigi sian menson; kiam lia koro estas ronĝata de ĉagreno, li ne povas ĝustigi sian menson.

所谓修身在正其心者，身有所忿懣，则不得其正；有所恐惧，则不得其正；有所好乐，则不得其正；有所忧患，则不得其正。

§07-02

Kiam oni estas distriĝema, tiam oni rigardas sen vidi, aŭskultas sen aŭdi, kaj manĝas eĉ sen scii la guston.

心不在焉，视而不见，听而不闻，食而不知其味。

§07-03

Jen tio, kion signifas la diro, ke la kulturado de la persona morala karaktero dependas de la ĝustigo de la menso.

此谓修身在正其心。

La supra sepa ĉapitro de la komentario klarigas la ĝustigon de la menso por la kulturado de la persona morala karaktero.

右传之七章。释正心修身。

§08

§08-01

Tio, kion signifas la diro, ke la harmoniigo de la familio dependas de la kulturado de la persona morala karaktero, povas esti klarigata kiel la jeno:

Oni kutime montras partiecan favoron al tiuj, kiujn oni amas, partiecan abomenon al tiuj, kiujn oni malŝatas, partiecan adoron al tiuj, kiujn oni respektegas; partiecan kompaton al tiuj, kiujn oni trovas kompatindaj, kaj partiecan malestimon al tiuj, kontraŭ kiuj oni estas aroganta. Jen kial en la mondo tre malmultaj povas koni la malbonajn kvalitojn de tiuj, kiujn ili amas, kaj la bonajn de tiuj, kiujn ili abomenas.

所谓齐其家在修其身者，人之其所亲爱而辟焉，之其所贱恶而辟焉，之其所畏敬而辟焉，之其所哀矜而辟焉，之其所敖惰而辟焉。故好而知其恶，恶而知其美者，天下鲜矣！

§08-02

Tial proverbo diras: “Oni ne konas la malbonecon de sia infano; oni ne kontentas pri la vigla kreskado de siaj grenplantoj.”

故谚有之曰：“人莫知其子之恶，莫知其苗之硕。”

§08-03

Jen kial estas dirite, ke oni apenaŭ povas harmoniigi la familion, se oni morale ne estas bone kulturita.

此谓身不修，不可以齐其家。

La supra oka ĉapitro de la komentario klarigas la kulturadon de la persona morala karaktero kaj la harmoniigon de la familio.

右传之八章。释修身齐家。

§09

§09-01

Tio, kion signifas la diro, ke la bona regado de regno necesigas antaŭ ĉio la harmoniigon de la familio, povas esti klarigata kiel la jeno:

Ekzistas neniu, kiu povus bonkondukti la popolon, se li ne bonkonduktigas siajn familianojn. Tial la bone kulturita homo povas kompletigi sian edukon pri la bona regado de la regno sen eliri el la hejmo. La ministroj povas bone servi sian suverenon en la maniero, en kiu la filo sindone servas siajn gepatrojn; la subuloj povas bone servi siajn superulojn en la maniero, en kiu la pli juna respektas siajn pli aĝajn fratojn; kaj la suvereno povas bone trakti siajn regatojn en la maniero, en kiu li amas siajn infanojn.

所谓治国必先齐其家者，其家不可教而能教人者，无之。故君子不出家而成教于国。孝者，所以事君也；弟者，所以事长也；慈者，所以使众也。

§09-02

Estas dirite en Kang Gao: “La suvereno devas ami siajn regatojn en la maniero, en kiu la gepatroj bone zorgas pri siaj novenaskitaj infanoj.” Kiam la patrino tutkore konjektas la intencojn de siaj infanoj, ŝiaj konjektoj, eĉ se ne tre precizaj, neniam povas esti malproksimaj de iliaj veraj deziroj. Ekzistas neniu virino, kiu lernus naski kaj varti infanojn antaŭ ol edziniĝi.

康诰曰“如保赤子”，心诚求之，虽不中不远矣。未有学养子而后嫁者也。

§09-03

Se la familianoj de la suvereno estas humanaj, la tuta nacio fariĝas humana; se la familianoj de la suvereno estas modestaj kaj ĝentilaj, la tuta nacio fariĝas modesta kaj ĝentila; se la suvereno mem estas avida kaj brutala, lia tuta regno povas esti kondukata al la ribela malordo. Tia estas la ekzemplodona rolo de la suvereno. Tio konfirmas la popoldiron: “Unusola vorto de suvereno povas ruinigi lian regnon, kaj la konduto de la suvereno sola povas stabiligi la tutan landon.”

一家仁，一国兴仁；一家让，一国兴让；一人贪戾，一国作乱；其机如此。此谓一言偾事，一人定国。

§09-04

La idealaj imperiestroj Yao kaj Shun regis la landon per la humaneco, kaj la popolo, sekvante ilin, fariĝis humana. La tiranoj Jie kaj Zhou regis la landon per krueleco, kaj la popolo, sekvante ilin, fariĝis kruela. La popolo ne obeas la suverenon, se ties ordonoj estas kontraŭ la volo de la popolo. Tial la suvereno devas posedi noblajn kvalitojn, antaŭ ol postuli, ke aliaj posedu tiajn kvalitojn, kaj devas senigi sin je malbonaj kvalitoj, antaŭ ol postuli, ke aliaj senigu sin je tiaj kvalitoj. Estas neeble por la suvereno persvadi aliajn fari bonon kaj forlasi malbonon, se al li mem mankas indulgemo kaj konsideroj por aliaj.

尧舜帅天下以仁，而民从之；桀纣帅天下以暴，而民从之；其所令反其所好，而民不从。是故君子有诸己而后求诸人，无诸己而后非诸人。所藏乎身不恕，而能喻诸人者，未之有也。

§09-05

Tial la antaŭa kondiĉo de la bona regado de regno estas la harmoniigo de la familio.
故治国在齐其家。

§09-06

Estas dirite en *Libro de Poezio*: “Jen floranta persikarbo, tiel delikata kaj eleganta! Kiel densa estas ĝia foliaro! La knabino nun edziniĝas, kaj ŝi vivos harmonie en sia nova hejmo.” Nur harmoniigante sian familion, la suvereno povas civilizi la popolon de la tuta lando.

诗云：“桃之夭夭，其叶蓁蓁；之子于归，宜其家人。”宜其家人，而后可以教国人。

§09-07

Estas dirite en *Libro de Poezio*: “La fratoj vivas en paco kaj harmonio.” Nur mem vivante kun siaj fratoj en paco kaj harmonio, la suvereno povas harmoniigi la popolon de la tuta lando.

诗云：“宜兄宜弟。”宜兄宜弟，而后可以教国人。

§09-08

Estas dirite en *Libro de Poezio* ankaŭ: “Kun siaj manieroj formalaj, la suvereno povas esti rigardata kiel modelo de ĉiuj regnoj.” Nur kiam la suvereno, kiel patro, filo, kaj frato, estas modela, la tuta popolo sekvas lian ekzemplon.

诗云：“其仪不忒，正是四国。”其为父子兄弟足法，而后民法之也。

§09-09

Jen tio, kion signifas la diro, ke la antaŭa kondiĉo de la bona regado de regno estas la harmoniigo de la familio.

此谓治国在齐其家。

La supra naŭa ĉapitro de la komentario klarigas la harmoniigon de la familio kaj la bonan regadon de la regno.

右传之九章。释齐家治国。

§10

§10-01

Tio, kion signifas la diro, ke la pacigo kaj feliĉigo de la mondo necesigas antaŭ ĉio la bonan regadon de regno, povas esti klarigata kiel la jeno:

Kiam la suvereno dece kondukas al la maljunuloj, tiam la fila devo estas plenumata universale inter la popolanoj; se la suvereno respektas la pliaĝulojn, tiam la respekto al la pliaĝuloj fariĝas komuna kutimo inter la popolanoj; kiam la suvereno traktas komplete la orfojn kaj donas helpon al ili, tiam la popolanoj faras la samon. Tial la suvereno devas funkcii per sia konduto kiel la modelo por sia popolo.

所谓平天下在治其国者：上老老而民兴孝，上长长而民兴弟，上恤孤而民不倍，是以君

子有絜矩之道也。

§10-02

Ne faru al viaj subuloj tiajn abomenaĵojn, kiajn faras al vi viaj superuloj; ne faru al viaj superuloj tiajn abomenaĵojn, kiajn faras al vi viaj subuloj. Ne faru al tiuj malantaŭ vi tiajn abomenaĵojn, kiajn faras al vi tiuj antaŭ vi; ne faru al tiuj antaŭ vi tiajn abomenaĵojn, kiajn faras al vi tiuj malantaŭ vi. Ne faru al tiuj maldekstre de vi tiajn abomenaĵojn, kiajn faras al vi tiuj dekstre de vi; ne faru al tiuj dekstre de vi tiajn abomenaĵojn, kiajn faras al vi tiuj maldekstre de vi. Jen la funkciado per la konduto kiel la modelo.

所恶于上，毋以使下；所恶于下，毋以事上；所恶于前，毋以先后；所恶于后，毋以从前；所恶于右，毋以交于左；所恶于左，毋以交于右：此之谓絜矩之道。

§10-03

Estas dirite en *Libro de Poezio*: “Kiel feliĉa estas la popolo, havante tian suveremon kiel sian patron!” La suvereno amas, kion la popolo amas, kaj abomenas, kion la popolo abomenas. Jen la amo de la suvereno kiel patro al sia popolo.

诗云：“乐只君子，民之父母。”民之所好好之，民之所恶恶之，此之谓民之父母。

§10-04

Estas dirite en *Libro de Poezio*: “Kiel la altega Suda Monto kun siaj rokoj firme starantaj, vi, la glora Granda Instruanto Yin, estas admirata de la popolo.” Tiu, kiu regas la landon, devas esti ekstreme singarda, ĉar, se li devias al perverseco, li certe estos malamata kaj punata de la popolo.

诗云：“节彼南山，维石岩岩，赫赫师尹，民具尔瞻。”有国者不可以不慎，辟则为天下僇矣。

§10-05

Estas dirite en *Libro de Poezio*: “La suverenoj de la dinastio Yin obeis la volon de la Ĉielo antaŭ ol perdi la subtenon de la popolo. Prenu averton el la falo de la dinastio Yin. Ne estas facile obei la volon de la Ĉielo.” Tio signifas, ke tiu, kiu ĝuas la subtenon de la popolo, akiras la landon, kaj tiu, kiu perdas la subtenon de la popolo, perdas la landon.

诗云：“殷之未丧师，克配上帝；仪监于殷，峻命不易。”道得众则得国，失众则失国。

§10-06

Tial la reganto devas meti la kulturadon de sia personeco sur la unuan lokon. Se li havas altan moralecon, li ĝuas la subtenon de la popolo. Se li ĝuas la subtenon de la popolo, li akiras la landon. Se li akiras la landon, li posedas riĉaĵojn. Se li posedas riĉaĵojn, li povas ilin utiligi.

是故君子先慎乎德。有德此有人，有人此有土，有土此有财，有财此有用。

§10-07

La moraleco estas la fundamento, kaj la riĉaĵoj estas akcesoraĵoj.

德者本也，财者末也。

§10-08

Se la suvereno neglektas la fundamenton kaj trogravigas la akcesoraĵojn, li kondukas la popolon al kverelado pro profito.

外本内末，争民施夺。

§10-09

Tial la akumuliĝo de riĉaĵoj ĉe la suvereno disigas la popolon for de li, dum la disdono de la riĉaĵoj al la popolanoj rekolektas ilin al li.

是故财聚则民散，财散则民聚。

§10-10

La paroloj de la suvereno, kiuj estas kontraŭ la vero, povas esti reciprokitaĵoj per la samo, kaj la riĉaĵoj, kiuj estas maljuste akiritaj, povas esti forrabigitaj en maljusta maniero.

是故言悖而出者，亦悖而入；货悖而入者，亦悖而出。

§10-11

Estas dirite en *Kang Gao*: “La volo de la Ĉielo ne povas esti ĉiam senŝanĝa.” Tio signifas, ke la suvereno observas la volon de la Ĉielo, se lia regado estas justa kaj humana, kaj li malobservas la volon de la Ĉielo, se lia regado estas maljusta kaj tiraneca.

康诰曰：“惟命不于常！”道善则得之，不善则失之矣。

§10-12

Estas dirite en *Chu Shu*, libro pri la regno Chu: “La regno Chu rigardas valoran nenion alian, krom la virto.”

楚书曰：“楚国无以为宝，惟善以为宝。”

§10-13

Zi Fan, la patrinflanka onklo de la duko Wen de la regno Jin, diris: “Tiu, kiu estas en ekzilo, havas nenion valoran krom la humaneco, kiun li rigardas kiel senprezan trezoron.”

舅犯曰：“亡人无以为宝，仁亲以为宝。”

§10-14

Estas dirite en *Qin Shi*, la Deklaracio de la princo Qin: “En mia kortego troviĝas ministro, kiu, kvankam havante nenian specialan lertecon, estas honesta, humana kaj grandanima. Kun ĝojo li rigardas alies lertecon kvazaŭ kiel siajn; li publike parolas pri alies virtoj, kaj lia admiro al ili en la koro estas pli forta, ol tiu en liaj buŝaj esprimoj. Lia koro estas sufiĉe spacohava, por loĝigi en si ĉies lertecon, talentojn kaj virtojn. Nomumi tiajn personojn kiel ministrojn garantias, ke miaj posteuloj kaj popolo estos gardataj, kaj estos multe profitigataj. Kontraŭe, se ministro envas kaj malamas alies lertecon, li ĉiel malhelpas, ke la kapablaj virtuloj estu nomumitaj al gravaj postenoj. Li toleras nenion pli

virtan kaj pli kapablan, ol li. Nomumi tiajn personojn kiel ministrojn ne sole ne garantias, ke miaj posteuloj kaj popolo estos gardataj, kaj estos multe profitigataj, sed eĉ metas nian landon en grandan danĝeron!”

秦誓曰：“若有一个臣，断断兮无他技，其心休休焉，其如有容焉。人之有技，若己有之，人之彦圣，其心好之，不啻若自其口出。寔能容之，以能保我子孙黎民，尚亦有利哉。人之有技，媚疾以恶之，人之彦圣，而违之俾不通，寔不能容，以不能保我子孙黎民，亦曰殆哉。”

§10-15

Nur la humana suvereno povas distingi kaj ekzili tiujn ministrojn, kiuj envias kaj malamas alies kapablon kaj virton, forpelante ilin el la lando al la malproksimaj necivilizitaj regionoj. Nur la humana suvereno povas ami la bonajn personojn kaj abomeni la malbonajn.

唯仁人放流之，进诸四夷，不与同中国。此谓唯仁人为能爱人，能恶人。

§10-16

Se kapablaj kaj virtaj personoj estas malkovritaj sed ne rekomenditaj, aŭ, ili estas rekomenditaj sed ne nomumitaj al gravaj postenoj, — tio estas malrespekto. Estas ankoraŭ pli granda eraro por la suvereno, se neindaj personoj estas malkovritaj sed ne eksigitaj, aŭ, eksigitaj sed ne forpelitaj malproksimen.

见贤而不能举，举而不能先，命也；见不善而不能退，退而不能远，过也。

§10-17

Ami, kion ĉiuj malamas, kaj malami, kion ĉiuj amas, difektas la homan naturon kaj provokas malfeliĉojn kaj katastrofojn.

好人之所恶，恶人之所好，是谓拂人之性，菑必逮夫身。

§10-18

Tial la suvereno devas sekvi la jenan ĝustan vojon: la trono estas atingita per sincereco kaj honesteco kaj perdita per malmodesteco kaj senbrideco en sia konduto.

是故君子有大道，必忠信以得之，骄泰以失之。

§10-19

Por krei riĉaĵojn, oni devas sekvi la jenan ĝustan vojon: havu pli da homoj en produktado, ol da homoj en konsumado, diligentigu la produktantojn kaj bridu la konsumantojn, kaj la riĉaĵoj ĉiam estos en sufiĉeco.

生财有大道，生之者众，食之者寡，为之者疾，用之者舒，则财恒足矣。

§10-20

Tiuj, kiuj sekvas la humanecon, malavare donacas siajn riĉaĵojn al aliaj en malfacilo, por gajni la fidon de la popolo, dum tiuj, kiuj ne sekvas la humanecon, amasigas riĉaĵojn je la kosto de sia vivo.

仁者以财发身，不仁者以身发财。

§10-21

Neniel povas okazi, ke la suvereno amas la humanecon, sed liaj ministroj ne amas la justecon, nek povas okazi, ke la ministroj, kiuj amas la justecon, malsukcesas en la plenumo de siaj devoj, kaj sekve en la regna trezorejo neniu riĉaĵo ne apartenas al la suvereno.

未有上好仁而下不好义者也，未有好义其事不终者也，未有府库财非其财者也。

§10-22

Meng Xian, la fama ministro de la regno Lu, diris: “La posedanto de granda kaleŝo kun jungitaro el kvar ĉevaloj ne devas zorgi pri tiaj bagatelaj aferoj, kiaj estas la bredado de kokoj kaj porkoj; la altaj ministroj ne devas profitigi sin per la bredado de bovoj kaj ŝafoj; la feŭduloj, kiuj posedas cent ĉarojn, ne devas teni vasalojn, kiuj estas lertaj en la amasigo de riĉaĵoj. Estus preferinde por feŭduloj teni vasalojn lertajn en ŝtelado de riĉaĵoj, ol vasalojn lertajn en amasigo de riĉaĵoj.” Tio signifas, ke la regno devas preni la justecon, ne la profiton, kiel sian intereson.

孟献子曰：“畜马乘不察于鸡豚，伐冰之家不畜牛羊，百乘之家不畜聚斂之臣，与其有聚斂之臣，宁有盗臣。”此谓国不以利为利，以义为利也。

§10-23

Se la suvereno absorbiĝas en la amasigo de pli da riĉaĵoj, li devas esti instigata de malnobluloj, kiuj estas profitavidaj kaj lertas en la amasigo de riĉaĵoj. Se ili estas permesataj regi la landon, ĉiaj katastrofoj kune falos al la lando, kaj tiam eĉ la plej kapabla virtulo povos trovi nenian rimedon por savi la situacion. Jen kial oni diras, ke la regno devas preni la justecon, ne la profiton, kiel sian intereson.

长国家而务财用者，必自小人矣。彼为善之，小人之使为国家，菑害并至。虽有善者，亦无如之何矣！此谓国不以利为利，以义为利也。

La supra ĉapitro de la komentario klarigas la bonan regadon de regno kaj la pacigon kaj feliĉigon de la mondo.

右传之十章。释治国平天下。

Entute estas dek ĉapitroj de la komentario. La unuaj kvar el ili diskutas, en ĝenerala maniero, pri la ĉefa temo de la verko, dum la aliaj ses aparte pri ĝiaj detaloj. La kvina ĉapitro entenas la gravan enhavon pri la kompreno de la perfekta boneco, kaj la sesa, pri fundamento de la atingo de la vera sincereco. Tiuj ĉi du ĉapitroj postulas la specialan atenton de la lernanto. Nepre ne lasu al la leganto neglekti ilin pro ilia simpleco.

凡传十章。前四章统论纲领指趣，后六章细论条目功夫。其第五章乃明善之要，第六章乃诚身之本，在初学尤为当务之急，读者不可以其近而忽之也。

APENDICO

Saĝaj vortoj el La Granda Lernado

出自《大学》的经典名句（已收入拙编《中华汉世语典》）

- 【财聚则民散，财散则民聚】 [cái jù zé mǐn sǎn, cái sǎn zé mǐn jù] la akumuliĝo de riĉaĵoj ĉe la suvereno disigas la popolon for de li, dum la disdono de la riĉaĵoj al la popolanoj rekolektas ilin al li (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)
- 【长国家而务财用者，必自小人矣】 [zhǎng guó jiā ér wù cái yòng zhě, bì zì xiǎo rén yǐ] Se la suvereno absorbiĝas en la amasigo de pli da riĉaĵoj, li devas esti instigata de malnobluloj, kiuj estas profitavidaj kaj lertas en la amasigo de riĉaĵo (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)
- 【诚其意者，毋自欺也】 [chéng qí yì zhě, wú zì qī yě] tio, kio estas nomata la sincerigo de la pensoj, signifas, ke oni nepre ne trompas sin mem (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)
- 【大学之道，在明明德，在亲民，在止于至善】 [dà xué zhī dào, zài míng míng dé, zài qīn mǐn, zài zhǐ yú zhì shàn] tio, kion *La Granda Lernado* instruas, celas briligigi la briligotan virton, instigi la homojn fari renovigon al sia vivo kaj inspiri al ili la kuraĝon strebi al la absoluta perfekteco (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*) / la celoj *La Granda Lernado* estas plilumigi la luman virton, renovigi la popolon kaj strebigi ilin al absoluta perfekteco
- 【得众则得国，失众则失国】 [dé zhòng zé dé guó, shī zhòng zé shī guó] tiu, kiu ĝuas la subtenon de la popolo, akiras la landon, kaj tiu, kiu perdas la subtenon de la popolo, perdas la landon (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)
- 【德者，本也；财者，末也】 [dé zhě, běn yě; cái zhě, mò yě] la moraleco estas la fundamento, kaj la riĉaĵoj estas akcesoraĵoj (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)
- 【富润屋，德润身，心广体胖】 [fù rùn wū, dé rùn shēn, xīn guǎng tǐ pán] la riĉeco ornamas la loĝejon, la virto ornamas la homon, kaj kiam oni havas larĝan spiriton, oni sentas sin sana kaj feliĉa (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)
- 【古之欲明明德于天下者，先治其国；欲治其国者，先齐其家；欲齐其家者，先修其身；欲修其身者，先正其心；欲正其心者，先诚其意；欲诚其意者，先致其知；致知在格物】 [gǔ zhī yù míng míng dé yú tiān xià zhě, xiān zhì qí guó; yù zhì qí guó zhě, xiān qí qí jiā; yù qí qí jiā zhě, xiān xiū qí shēn; yù xiū qí shēn zhě, xiān zhèng qí xīn; yù zhèng qí xīn zhě, xiān chéng qí yì; yù chéng qí yì zhě, xiān zhì qí zhī; zhì zhī zài gé wù] en la antikveco tiu, kiu deziris plibriligi sian briligotan virton en la mondo, devis antaŭ ĉio fari sian regnon bone regata; kiu deziris fari sian regnon bone regata, devis antaŭ ĉio harmoniigi sian familion; kiu deziris harmoniigi sian familion, devis antaŭ ĉio kulturi sian personecon; kiu deziris kulturi sian personecon, devis antaŭ ĉio honestigi sian konduton; kiu deziris honestigi sian konduton, devis antaŭ ĉio sincerigi siajn pensojn; kiu deziris sincerigi siajn pensojn, devis antaŭ ĉio peni akiri ankoraŭ pli da scioj; la metodo akiri sciojn kuŝas en la esplorado de la estaĵoj kaj la fenomenoj de la mondo (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)
- 【国不以利为利，以义为利也】 [guó bú yǐ lì wéi lì, yǐ yì wéi lì yě] la regno devas preni la justecon, ne la profiton, kiel sian intereson (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)
- 【好人之所恶，恶人之所好，是谓拂人之性，菑必逮夫身】 [hào rén zhī suǒ è, è rén zhī suǒ hǎo, shì wéi fú rén zhī xìng, zī bì dǎi fū shēn] ami, kion ĉiuj malamas, kaj malami, kion ĉiuj amas, difektas la homan naturon kaj provokas malfeliĉojn kaj katastrofojn (el la klasikaĵo

La Granda Lernado)

【家齐而后国治，国治而后平天下】 [jiā qí ér hòu guó zhì, guó zhì ér hòu píng tiān xià] kiam la familio estas harmoniigita, oni povas bone regi sian regnon; kiam la regno estas bone regata, la tuta mondo povas esti en feliĉa paco (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)

【见贤而不能举，举而不能先，命也；见不善而不能退，退而不能远，过也】 [jiàn xián ér bú néng jǔ, jǔ ér bú néng xiān, mìng yě; jiàn bù shàn ér bú néng tuì, tuì ér bú néng yuǎn, guò yě] se kapablaj kaj virtaj personoj estas malkovritaj sed ne rekomenditaj, aŭ, ili estas rekomenditaj sed ne nomumitaj al gravaj postenoj, — tio estas malrespekto; estas ankoraŭ pli granda eraro por la suvereno, se neindaj personoj estas malkovritaj sed ne eksigitaj, aŭ, eksigitaj sed ne forpelitaj malproksimen (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)

【君子必慎其独也】 [jūn zǐ bì shèn qí dú yě] la homo de alta moraleco devas esti singarda pri siaj manieroj eĉ tiam, kiam oni estas tute sola (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)

【君子贤其贤而亲其亲，小人乐其乐而利其利，此以没世不忘也】 [jūn zǐ xián qí xián ér qīn qí qīn, xiǎo rén lè qí lè ér lì qí lì, cǐ yǐ méi shì bú wàng yě] la suverenoj de la postaj epokoj, sekvante ilian ekzemplon, respektis siajn virtajn ministrojn kaj amis siajn parencojn; iliaj regatoj ĝuis iliajn favorojn kaj profitis de tio, kion ili fondis por la bono de la popolo, kaj tial, tiuj grandaj regantoj estas neniam forgesitaj (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)

【君子有大道，必忠信以得之，骄泰以失之】 [jūn zǐ yǒu dà dào, bì zhōng xìn yǐ dé zhī, jiāo tài yǐ shī zhī] la suvereno devas sekvi la jenan ĝustan vojon: la trono estas atingita per bonfido kaj honesteco kaj perdita per malmolesteco kaj senbrideco en sia konduto (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)

【君子有诸己而后求诸人，无诸己而后非诸人】 [jūn zǐ yǒu zhū jǐ ér hòu qiú zhū rén, wú zhū jǐ ér hòu fēi zhū rén] tial la suvereno devas posedi noblajn kvalitojn, antaŭ ol postuli, ke aliaj posedi tiajn kvalitojn, kaj devas senigi sin je malbonaj kvalitoj, antaŭ ol postuli, ke aliaj senigi sin je tiaj kvalitoj (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)

【康诰曰：惟命不于常；道善则得之，不善则失之矣】 [kāng gào yuē: wéi mìng bú yú cháng; dào shàn zé dé zhī, bù shàn zé shī zhī yǐ] estas dirite en Kang Gao: “la volo de la Ĉielo ne povas esti ĉiam senŝanĝa”; tio signifas, ke la suvereno observas la volon de la Ĉielo, se lia regado estas justa kaj humana, kaj li malobservas la volon de la Ĉielo, se lia regado estas maljusta kaj tiraneca (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)

【民之所好，好之；民之所恶，恶之，此之谓民之父母】 [mín zhī suǒ hào, hào zhī; mín zhī suǒ wù, wù zhī] la suvereno amas, kion la popolo amas, kaj abomenas, kion la popolo abomenas; jen la amo de la suvereno kiel patro al sia popolo (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)

【人莫知其子之恶，莫知其苗之硕；此谓身不修不可以齐其家】 [rén mò zhī qí zǐ zhī è, mò zhī qí miáo zhī shuò; cǐ wèi shēn bú xiū bú kě yǐ qí qí jiā] oni ne konas la malbonecon de sia infano; oni ne kontentas pri la vigla kreskado de siaj grenplantoj; jen kial estas dirite, ke oni apenaŭ povas harmoniigi la familion, se oni morale ne estas bone kulturita (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)

【仁者以财发身，不仁者以身发财】 [rén zhě yǐ cái fā shēn, bù rén zhě yǐ shēn fā cái] tiuj, kiuj sekvas la humanecon, malavare donacas siajn riĉaĵojn al aliaj en malfacilo, por gajni la fidon de la popolo, dum tiuj, kiuj ne sekvas la humanecon, amasigas riĉaĵojn je la kosto de sia vivo (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)

【生财有大道，生之者众，食之者寡，为之者疾，用之者舒，则财恒足矣】 [shēng cái yǒu

dà dào, shēng zhī zhě zhòng, shí zhī zhě guǎ, wéi zhī zhě jí, yòng zhī zhě shū, zé cái héng zú yǐ] por krei riĉaĵojn, oni devas sekvi la jenan ĝustan vojon: havu pli da homoj en produktado, ol da homoj en konsumado, diligentigu la produktantojn kaj bridu la konsumantojn, kaj la riĉaĵoj ĉiam estos en sufiĉeco (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)

【十目所视，十手所指】 [shí mù suǒ shì, shí shǒu suǒ zhǐ] kun multaj okuloj rigardantaj kaj multaj fingroj montrantaj — oni ne povas fari malbonon sub la ĝenerala kontrolobservo / se vi faras malbonon, ĉiuj ĝin vidas kaj kondamnas (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*: La majstro Zeng diris: “kun multaj okuloj rigardantaj kaj multaj fingroj montrantaj, oni neniel povas ne esti singarda pri siaj agoj!”)

【是故君子有大道：必忠信以得之，骄泰以失之】 [shì gù jūn zǐ yǒu dà dào: bì zhōng xìn yǐ dé zhī, jiāo tài yǐ shī zhī] tial la suvereno devas sekvi la jenan ĝustan vojon: la trono estas atingita per bonfido kaj honesteco kaj perdita per malmolesteco kaj senbrideco en sia konduto (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)

【是故言悖而出者，亦悖而入；货悖而入者，亦悖而出】 [shì gù yán bèi ér chū zhě, yì bèi ér rù; huò xìng ér rù zhě, yì bèi ér chū] la paroloj de la suvereno, kiuj estas kontraŭ la vero, povas esti reciprokitaĵoj per la samo, kaj la riĉaĵoj, kiuj estas maljuste akiritaj, povas esti forrabigitaj en maljusta maniero (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)

【所恶于上毋以使下；所恶于下毋以事上；所恶于前毋以先后；所恶于后毋以从前；所恶于右毋以交于左；所恶于左毋以交于右】 [suǒ è yú shàng wú yǐ shǐ xià; suǒ è yú xià wú yǐ shì shàng; suǒ è yú qián wú yǐ xiān hòu; suǒ è yú hòu wú yǐ cóng qián; suǒ è yú yòu wú yǐ jiāo yú zuǒ; suǒ è yú zuǒ wú yǐ jiāo yú yòu] ne faru al viaj subuloj tiajn abomenaĵojn, kiajn faras al vi viaj superuloj; ne faru al viaj superuloj tiajn abomenaĵojn, kiajn faras al vi viaj subuloj; ne faru al tiuj malantaŭ vi tiajn abomenaĵojn, kiajn faras al vi tiuj antaŭ vi; ne faru al tiuj antaŭ vi tiajn abomenaĵojn, kiajn faras al vi tiuj malantaŭ vi; ne faru al tiuj maldekstre de vi tiajn abomenaĵojn, kiajn faras al vi tiuj dekstre de vi; ne faru al tiuj dekstre de vi tiajn abomenaĵojn, kiajn faras al vi tiuj maldekstre de vi; jen la funkciado per la konduto kiel la modelo (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)

【所谓平天下在治其国者，上老老而民兴孝，上长长而民兴弟，上恤孤而民不倍，是以君子有挈矩之道也】 [suǒ wèi píng tiān xià zài zhì qí guó zhě, shàng lǎo lǎo ér mǐn xìng xiào, shàng zhǎng zhǎng ér mǐn xìng dì, shàng xù gū ér mǐn bú bèi, shì yǐ jūn zǐ yǒu qiè jǔ zhī dào yě] Tio, kion signifas la diro, ke la pacigo kaj feliĉigo de la mondo necesigas antaŭ ĉio la bonan regadon de regno, povas esti klarigata kiel la jeno: kiam la suvereno dece kondukas al la maljunuloj, tiam la fila devo estas plenumata universale inter la popolanoj; se la suvereno respektas la pliaĝulojn, tiam la respekto al la pliaĝuloj fariĝas komuna kutimo inter la popolanoj; kiam la suvereno traktas komplete la orfojn kaj donas helpon al ili, tiam la popolanoj faras la samon; tial la suvereno devas funkcii per sia konduto kiel la modelo por sia popolo (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)

【所谓齐其家在修其身者，人之其所亲爱而辟焉，之其所贱恶而辟焉，之其所敬畏而辟焉，之其所哀矜而辟焉，之其所敖惰而辟焉；故好而知其恶，恶而知其美者，天下鲜矣】 [suǒ wèi qí qí jiā zài xiū qí shēn zhě, rén zhī qí suǒ qīn ài ér pì yān, zhī qí suǒ jiàn è ér pì yān, zhī qí suǒ jìng wèi ér pì yān, zhī qí suǒ āi jīn ér pì yān, zhī qí suǒ áo duò ér pì yān; gù hǎo ér zhī qí è ér zhī qí měi zhě, tiān xià xiǎn yǐ] tio, kion signifas la diro, ke la harmoniigo de la familio dependas de la kulturado de la persona morala karaktero, povas esti klarigata kiel la jeno: oni kutime montras partecan favoron al tiuj, kiujn oni amas, partecan abomenon al tiuj,

kiujn oni malŝatas, partiecan adoron al tiuj, kiujn oni respektegas; partiecan kompaton al tiuj, kiujn oni trovas kompatindaj, kaj partiecan malestimon al tiuj, kontraŭ kiuj li estas aroganta. Jen kial en la mondo tre malmultaj povas koni la malbonajn kvalitojn de tiuj, kiujn ili amas, kaj la bonajn de tiuj, kiujn ili abomenas (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)

【所谓修身在正其心者：身有所忿懣，则不得其正；有所恐惧，则不得其正；有所好乐，则不得其正；有所忧患，则不得其正】 [suǒ wèi xiū shēn zài zhèng qí xīn zhě: shēn yǒu suǒ fèn zhì zé bú dé qí zhèng; yǒu suǒ kǒng jù, zé bú dé qí zhèng; yǒu suǒ hào lè, zé bú dé qí zhèng; yǒu suǒ yōu huàn, zé bú dé qí zhèng] tio, kion signifas la diro, ke la kulturado de la persona morala karaktero dependas de la ĝustigo de la menso, povas esti ilustrita tiele: kiam la homo havas la koron loĝata de kolero, li ne povas ĝustigi sian menson; kiam lia koro estas premata de timo, li ne povas ĝustigi sian menson; kiam lia koro estas plena de plezurserĉemo, li ne povas ĝustigi sian menson; kiam lia koro estas rongata de ĉagreno, li ne povas ĝustigi sian menson (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)

【所谓治国必先齐其家者，其家不可教而能教人者，无之】 [suǒ wèi zhì guó bì xiān qí qí jiā zhě, qí jiā bú kě jiāo ér néng jiāo rén zhě, wú zhī] ekzistas neniu, kiu povus bonkondukti la popolon, se li ne bonkonduktigas siajn familianojn (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)

【所谓治国必先齐其家者，其家不可教而能教人者，无之；故君子不出家而成教于国：孝者，所以事君也；悌者，所以事长也；慈者，所以使众也】 [suǒ wèi zhì guó bì xiān qí qí jiā zhě, qí jiā bú kě jiāo ér néng jiāo rén zhě wú zhī; gù jūn zǐ bú chū jiā ér chéng jiāo yú guó xiào zhě, suǒ yǐ shì jūn yě; tì zhě, suǒ yǐ shì zhǎng yě; cí zhě, suǒ yǐ shǐ zhòng yě] tio, kion signifas la diro, ke la bona regado de regno necesigas antaŭ ĉio la harmoniigon de la familio, povas esti klarigata kiel la jeno: ekzistas neniu, kiu povus bonkondukti la popolon, se li ne bonkonduktigas siajn familianojn; tial la bone kulturita homo povas kompletigi sian edukon pri la bona regado de la regno sen eliri el la hejmo; la ministroj povas bone servi sian suverenon en la maniero, en kiu la filo sindone servas siajn gepatrojn; la subuloj povas bone servi siajn superulojn en la maniero, en kiu la pli juna respektas siajn pli aĝajn fratojn; kaj la suvereno povas bone trakti siajn regatojn en la maniero, en kiu li amas siajn infanojn (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)

【汤之盘铭曰：苟日新，日日新，又日新】 [tāng zhī pán míng yuē: gǒu rì xīn, rì rì xīn, yòu rì xīn] sur la bankuvo de Tang, la fondinto de la dinastio Shang, estas gravurita la jenaj vortoj: “se vi povas hodiaŭ purigi vin por havi novan komencon en la vivo, havu do novan komencon en ĉiu tago, kaj persiste havu ĝin ĉiutage dum la vivo” (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)

【外本内末，争民施夺】 [wài běn nèi mò, zhēng mín shī duó] se la suvereno neglektas la fundamenton kaj trogravigas la akcesoraĵojn, li kondukas la popolon al kverelado pro profito (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)

【为人君，止于仁；为人臣，止于敬；为人子，止于孝；为人父，止于慈；与国人交，止于信】 [wéi rén jūn, zhǐ yú rén; wéi rén chén, zhǐ yú jìng; wéi rén zǐ, zhǐ yú xiào; wéi rén fù, zhǐ yú cí; yǔ guó rén jiāo, zhǐ yú xìn] kiel suvereno li dediĉis sin al la humaneco kaj la justeco; kiel ministro li dediĉis sin al la respektado al la suvereno; kiel filo li dediĉis sin al la fila devo al la gepatroj; kiel patro li dediĉis sin al la patra amo al la gefiloj; kiel amiko li dediĉis sin al la honesteco kaj la fideco (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)

【为天下僇】 [wéi tiān xià lù] esti malamata kaj punata de la tuta popolo (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*): tiu, kiu regas la landon, devas esti ekstreme singarda, ĉar, se li devias al

perverseco, li certe estos malamata kaj punata de la popolo)

- 【楚国无以为宝，惟善以为宝】 [chǔ guó wú yǐ wéi bǎo, wéi shàn yǐ wéi bǎo] la regno Chu rigardas valora nenion alian, ol la virto (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)
- 【物格而后知至；知至而后意诚；意诚而后心正；心正而后身修；身修而后家齐；家齐而后国治；国治而后天下平】 [wù gé ér hòu zhī zhì; zhī zhì ér hòu yì chéng; yì chéng ér hòu xīn zhèng; xīn zhèng ér hòu shēn xiū; shēn xiū ér hòu jiā qí; jiā qí ér hòu guó zhì; guó zhì ér hòu tiān xià píng] per la esplorado de la estaĵoj kaj la fenomenoj oni povas akiri sciojn; kiam scioj estas akiritaj, oni povas sincerigi siajn pensojn; kiam la pensoj estas sincerigitaj, oni povas honestigi sian konduton; kiam la konduto estas honestigita, oni povas kultiri sian personecon; kiam la personeco estas kulturita, oni povas harmoniigi sian familion; kiam la familio estas harmoniigita, oni povas bone regi sian regnon; kiam la regno estas bone regata, la tuta mondo povas esti en feliĉa paco (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)
- 【物有本末，事有终始，知所先后，则近道矣】 [wù yǒu běn mò, shì yǒu zhōng shǐ] ĉiu afero havas sian radikon siajn akcesoraĵojn kaj ĉiu okazaĵo havas sian komencon kaj finon (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)
- 【小人闲居为不善，无所不至，见君子而后厌然，拚其不善，而著其善】 [xiǎo rén xián jū wéi bù shàn, wú suǒ bù zhì, jiàn jūn zǐ ér hòu yàn rán, pīn qí bù shàn, ér zhe qí shàn] (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)
- 【小人小人闲居为不善，无所不至】 [xiǎo rén xiǎo rén xián jū wéi bù shàn, wú suǒ bù zhì] la homo vulgaranima kaptas ĉiun okazon, en kiu li estas sola, por fari senskrupule malmoralajon (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)
- 【心不在焉，视而不见，听而不闻，食而不知其味；此谓修身在正其心】 [xīn bú zài yān, shì ér bú jiàn, tīng ér bù wén, shí ér bù zhī qí wèi; cǐ wèi xiū shēn zài zhèng qí xīn] kiam oni estas distriĝema, tiam oni rigardas sen vidi, aŭskultas sen aŭdi, kaj manĝas eĉ sen scii la guston; jen tio, kion signifas la diro, ke la kulturado de la persona morala karaktero dependas de la ĝustigo de la menso (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)
- 【心诚求之，虽不中，不远矣】 [xīn chéng qiú zhī, suī bù zhōng, bù yuǎn yǐ] kiam la patrino tutkore konjektas la intencojn de siaj infanoj, ŝiaj konjektoj, eĉ se ne tre precizaj, neniam povas esti malproksimaj de iliaj veraj deziroj — se oni penas fari sian plejblon, oni cert ne estos malproksime de sia celo (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)
- 【修身齐家治国平天下】 [xiū shēn qí jiā zhì guó píng tiān xià] oni devas antaŭ ĉio perfektigi sian personecon por poste havi familion en harmonio, sian regnon bone administrata, kaj fine, meti la tutan mondon en bonan ordon (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*: kiam la konduto estas honestigita, oni povas kultiri sian personecon; kiam la personeco estas kulturita, oni povas harmoniigi sian familion; kiam la familio estas harmoniigita, oni povas bone regi sian regnon; kiam la regno estas bone regata, la tuta mondo povas esti en feliĉa paco)
- 【一家仁，一国兴仁；一家让，一国兴让；一人贪戾，一国作乱；其机如此；此谓一言偾事，一人定国】 [yī jiā rén, yī guó xìng rén; yī jiā ràng, yī guó xìng ràng; yī rén tān lì, yī guó zuò luàn; qí jī rú cǐ; cǐ wèi yī yán fèn shì, yī rén dìng guó] se la familianoj de la suvereno estas humanaj, la tuta nacio fariĝas humana; se la familianoj de la suvereno estas modestaj kaj ĝentilaj, la tuta nacio fariĝas modesta kaj ĝentila; se la suvereno mem estas avida kaj brutala, lia tuta regno povas esti kondukata al la ribela malordo; tia estas la ekzemplodona rolo de la suvereno; tio konfirmas la popoldiron: “ unusola vorto de suvereno povas ruinigi sian regnon, kaj la kondulo de la suvereno sola povas stabiligi la tutan landon (el la klasikaĵo *La Granda*

Lernado)

- 【有国者不可以不慎，辟则为天下僇矣】 [yǒu guó zhě bù kě yǐ bù shèn, pì zé wéi tiān xià liáo yǐ] tiu, kiu regas la landon, devas esti ekstreme singarda, ĉar, se li devias al perverseco, li certe estos malamata kaj punata de la popolo (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)
- 【欲诚其意者，先致其知】 [yù chéng qí yì zhě, xiān zhì qí zhī] kiu deziras sincerigi siajn pensojn, devas antaŭ ĉio peni akiri ankoraŭ pli da scioj (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)
- 【欲修其身者，先正其心】 [yù xiū qí shēn zhě, xiān zhèng qí xīn] kiu deziras kulturi sian personecon, devas antaŭ ĉio honestigi sian konduton (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)
- 【欲正其心者，先诚其意】 [yù zhèng qí xīn zhě, xiān chéng qí yì] kiu deziras honestigi sian konduton, devas antaŭ ĉio sincerigi siajn pensojn (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)
- 【知止而后有定；定而后能静；静而后能安；安而后能虑；虑而后能得】 [zhī zhǐ ér hòu yǒu dìng; dìng ér hòu néng jìng; jìng ér hòu néng ān; ān ér hòu néng lǜ; lǜ ér hòu néng dé] kun tiuj ĉi celoj en la menso oni povas firmigi sian aspiron; kun sia firmigita aspiro, oni povas kvietigi sian mensostaton; kun sia kvietigita mensostato, oni povas fari profundan pensadon; kaj nur kun sia profunda pensado, oni povas atingi la deziratan celon (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)
- 【知至而后意诚，意诚而后心正】 [zhī zhì ér hòu yì chéng, yì chéng ér hòu xīn zhèng] kiam scioj estas akiritaj, oni povas sincerigi siajn pensojn; kiam la pensoj estas sincerigitaj, oni povas honestigi sian konduton (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)
- 【致知在格物，物格而后知至】 [zhì zhī zài gé wù, wù gé ér hòu zhī zhì] la metodo akiri sciojn kuŝas en la esplorado de la estaĵoj kaj la fenomenoj de la mondo; per la esplorado de la estaĵoj kaj la fenomenoj oni povas akiri sciojn (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*) ——参见“格物致知”
- 【子曰：听讼，吾犹人也，必也使无讼乎！无情者不得尽其辞，大畏民志，此谓知本】 [zǐ yuē: tīng sòng, wú yóu rén yě, bì yě shǐ wú sòng hū! wú qíng zhě bú dé jìn qí cí, dà wèi mín zhì, cǐ wèi zhī běn] Konfuceo diris: “juĝante procesojn, mi estas same kiel la alia; laŭ mi, tio, kio estas necesa, estas igi la popolon havi nenian proceson?”; tio signifas, ke oni devas malebligi al la falsemuloj laŭvole paroli, kaj penas fari la grandajn virtojn superregantaj, ke la popolo observu la leĝojn kun timo; jen kio estas nomata la sciado de la fundamento (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)
- 【自天子以至于庶人，壹是皆以修身为本】 [zì tiān zǐ yǐ zhì yú shù rén, yī shì jiē yǐ xiū shēn wéi běn] la kulturado de la persona morala karaktero havas fundamentan gravecon por ĉiuj homoj, inkluzive la Filon de la Ĉielo, ministrojn kaj la ordinarajn popolanojn (el la klasikaĵo *La Granda Lernado*)